
# Bona Espero



**Cirkulero 73**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.** **Januaro 2012**
prezidanto: Bernd Schönberner ★ Westermannweg 17 B ★ D-30419 Hannover
☏ +49-(0) 511 7 63 63 565 ★ 💻 schoenberner.bernd@t-online.de

*Karaj amikoj kaj subtenantoj,*
*antaŭ kelka tempo Ursula sendis al mi jenan leteron*
*kun interesaj novaĵoj pri Bona Espero:*

"Nia kara prezidanto Bernd Schönberner promesis en la lasta cirkulero 72, ke estante pensiulo, li nun povos magii multe pli. Sed fakte lia koro havis aliajn planojn kaj devigis lin zorgi pri si mem post jaroj da nobla misio "instrui la estontajn generaciojn al pli bona mondo kaj pli feliĉa homaro",kiel diras la statuto de Bona Espero. Sed feliĉe nun li denove bonfartas kaj ni ĉiuj ĝojas multe pri tio!



**La infanoj** En tuta Brazilo kaj ankaŭ en nia regiono, blovas vento de evoluo. Sed la ekonomia evoluo ne akompanas la moralan kaj daŭre ni ricevas urĝajn alvokojn de la juĝistaj instancoj por protekti infanojn mistraktitajn plej ofte en la respektivaj familiaj medioj. Tiel ĉijare plinombriĝis al 38 nia infanaro, el kiuj 22 loĝas konstante en Bona Espero kaj la aliaj 16 alvenas ĉiutage per la urba transporto por lerni sub la gvido de du instruistinoj.

| **donacokonto:** | kasistino: |
| --- | --- |
| **konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede** | Dagmar Rahn ⌑ Hirschfeldstr. 3 ⌑ D-59581 Warstein |
| **(BLZ / bankkodo 464 510 12)** | ☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328 |
| **IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484** | 💻 dagmar@rahn76.de |
| **BIC : WELADED1MES** | |



**La damaĝoj de la fajro**

Kiel jam raportite, la teritorio de Bona Espero estis trafita de **granda incendio**. Tuj diskoniĝis la bedaŭrinda evento tra la esperantista mondo kaj aperis spontanee granda solidareco. Dum monatoj sur nian konton ĉe UEA kaj ĉe la subtena asocio alvenis grandaj kaj malgrandaj donacoj por entute 8074 eŭroj (18.108 realoj) kaj ankaŭ en Brazilo dekoj da esperantistoj kontribuis entute per 10.070 realoj (5.000 eŭroj).
Per tiu helpo ni povis mendi 900 fostojn el ferbetono kaj 30 km da ferdrato kaj rekonstrui ĉ. 9 kilometrojn de barilo per granda pena laboro. Inkluzive nun, per pruntedonitaj traktoroj de la urba estraro, nia enirvojo fariĝis tre impone larĝa kun ambaŭflanke la nova barilo.



Intertempe daŭras niaj leĝaj klopodoj por garantii la grundo-propraĵon kaj eviti invadon de friponoj! Por eviti en la seka sezono 2011 novan katastrofan fajron, ni venigis 13 fajrobrigadistojn de la Nacia Parko por krei 5 km da protekta zono ĉirkaŭ niaj domoj kaj plantaĵoj. Nun jam komencis la pluva sezono kaj ĉijare ni estas sekuraj de fajroj.

Granda plibonigo estas la daŭre funkcianta ventomuelilo, kiun ni instalis por pligrandigi la kvanton da necesa akvo por la domoj kaj legomejoj.




## TELECENTRO

Nia telecentro senhalte funkcias kaj ĉiuj infanoj lernas uzi komputilon ĉar ni ja devas prepari ilin por la "labormerkato" post kelkaj jaroj kaj en ĉiuj profesioj preskaŭ oni bezonas komputilon.

La loka Rotaria klubo translokiĝis al alia domo kaj ni en 2011 cedis al la plej prestiĝa Universitato de Brasília UNB niajn instalaĵojn por oferti kursojn al 60 studentoj dum ankoraŭ ne finkonstruiĝis filio de tiu universitato pri savanaj studoj.

Igor (16jara), la filo de nia estraranino Ada loĝadis dum la semajno en la domo por konkludi ĉijare siajn mezgradajn studojn kaj jam komencis partopreni kurson de UNB.




## NIA AGRIKULTURA PRODUKTADO



La vasta legomejo de Bona Espero produktas plej diversajn legomojn: brasikoj, laktukoj, melongenoj, kukurboj, karotoj, tomatoj, manjoko, fenkoloj, artiŝokoj, ktp. . La fruktarboj produktas bananojn, avokadoj, citronoj, oranĝoj, mangoj, ktp. . Zorgas nian agrikulturan departamenton Damião kaj Riccardo.

| | |
|---|---|
| **donacokonto:**<br>**konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede**<br>**(BLZ / bankkodo 464 510 12)**<br>**IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484**<br>**BIC : WELADED1MES** | kasistino:<br>Dagmar Rahn ⌑ Hirschfeldstr. 3 ⌑ D-59581 Warstein<br>☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328<br>💻 dagmar@rahn76.de |

Ni produktas ankaŭ dum la seka sezono danke al la mirakla vento-muelilo kiu funkcias sen elektra energio, do nia kontribuo al daŭripova evoluo!!! kaj liveras akvon al la malproksimaj plantejoj rekte el la lago.



Krom **Damião**-n, Bona Espero oficiale dungis plentempe la eks-lernanton **Valdemar**. Evidente tio plialtigis la elspezojn de nia Institucio sed garantias la kontinuecon de la laboroj, kiuj ne povas esti plenumitaj nur de bonvolaj volontuloj.

Ni, **Giuseppe kaj Ursula**, vizitis komence de novembro **onklinon Neŭza** en Recife. Kun siaj 93 jaroj kaj bonega sanstato, ŝi pasigis horojn kun ili rememorante la tempon en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj, kiam ŝi kaj Velozo instruis al la dua generacio de respondeculoj, pri Bona Espero, kiel alfronti la problemojn kaj ĝojojn de tiu verda revo.





Kaj nun jam laboras kaj respondecas la 3a generacio en la personoj de Ada kaj Clarimundo en la estraro kaj Riccardo kiel edzo de Ada kaj jam nun de tri jaroj respondeca pri la agrikultura produktado kaj la administrado de la domoj kaj vojoj kune kun alia ekslernanto Valdemar.

Ek de meze de la jaro **Giuseppe kaj Ursula,** post komuna decido de la estraro en la jara asembleo, pasigas pli da tempo en Brasília kaj vizitas Bona Esperon dum kelkaj tagoj monate.



Ilia laboro por la institucio daŭras koncerne la financan administradon kune kun Clarimundo en Brasilia, la kontaktojn kun la diversaj instancoj de la registaro, sociaj servoj, tribunalo kaj la subtena kaj volontula reto tutmonda. Tiujn taskojn ili povas majstri bone en Brasilia, kie ili ankaŭ povas ripozi post 37 jaroj da senhalta laboro kun la infanoj kaj esti pli apudaj ol en la bieno al medicina helpo en kazo de neceso.

Tiel la transiro de unu generacio al la alia okazas sen skuoj kaj problemoj por la institucio kaj la laboro, laŭ multe pli facilaj kondiĉoj, povas daŭrigi kaj kreski sendube.



**Volontuloj**

Krom la estraraj volontuloj, kiuj ek de jardekoj servas la *idealojn kaj la realojn* de la institucio, ni feliĉe ricevas kunlaboron de bonvolaj helpantoj el la plej diversaj partoj de la mondo, kiuj per la uzo de esperanto, venkas ĉiujn komunikajn problemojn. La listo en 2011 estas aparte simpatia kaj mi volonte listigas la bonvolulojn:

En januaro alvenis por la 80ª naskiĝdatreveno de Giuseppe speciala paro de homoj, kiuj ek de la naŭdekaj jaroj estas subtenantoj de nia laboro: la nun germana ambasadoro **Peter Platte kaj lia edzino Gisela.** Dum li devis reveni por deĵori en sia grava tasko kiel reprezentanto de la germana ŝtato en Montenegro, Gisela, (kiu cetere bonege parolas la portugalan) restis kelkajn semajnojn por ludi kaj instrui. Vidu ŝin instruante naĝi en la naĝejo!





Du francinoj el Bretonio, **Anne kaj Claire**, amikinoj de Gaby, Helene kaj Jeanclaude, multege kaj harmonie helpis zorgi la infanojn kaj la manĝojn.

Brazilaj esperantistaj volontuloj estis samtempe ĉe ni: D-rino **Rosangela** kaj **Guilherme** el Rio de Janeiro. Rosangela estas kapitano-dentistino ĉe la mararmeo kaj zorgis en nia nova kabineto la dentojn de la infanoj.

Fakte ni ricevis donace de rotaria klubo “Centenário” en Brasília la necesajn aparatojn kaj rotariano-esperantisto en Belgio, d-ro **Joseph Van der Vleugel**,donacis la necesajn laborilojn.



Alia rotariano-esperantisto **Michael Cwik** kunlaboris en la transporto de tiuj iloj krom pliaj de sia propra klubo. Michael kunlaboris dum pli ol tuta monato, ĉefe pri la limigoj de la tuta teritorio de nia institucio per mapoj el google earth ktp. .

| **donacokonto:** | kasistino: |
|---|---|
| **konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede** | Dagmar Rahn ⌑ Hirschfeldstr. 3 ⌑ D-59581 Warstein |
| **(BLZ / bankkodo 464 510 12)** | ☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328 |
| **IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484** | 💻 dagmar@rahn76.de |
| **BIC : WELADED1MES** | |



Tiel en Julio 4 junaj dentistoj, volontuloj, dum du semajnoj povis zorgi ne nur la dentojn de niaj infanoj, sed ankaŭ tiujn de la plenkreskuloj kaj najbaroj de la regiono.

En aprilo alvenis speciala esperantista, el Prago, piloto de aviadiloj **Jan Pospicil,** kiu entuziasme proponis kaj faris la tradukon de la libro de Roman Dobrzynski pri Bona Espero en la ĉekan lingvon en la retejo.





En Julio nin vizitis dr-ino **Katalin Kovats kaj ŝia filino Petra**. Ili donacis al ni centojn da belegaj fotoj kaj edukajn materialojn por la infanoj, ĉefe grandkvante la famegan poŝamikon, kiun la infanoj ege ŝatas.

Nun helpas nin bonega esperantistino s-ino **Zofia Loiseau** el Bretonio ek de oktobro ĝis januaro. Ŝi estas altvalora por la infanoj, ĉar restas pli da tempo kaj tio estas certe pli bona kondiĉo ol nur mallongaj vizitoj.


| **donacokonto:** | kasistino: |
|---|---|
| **konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede** | Dagmar Rahn ¤ Hirschfeldstr. 3 ¤ D-59581 Warstein |
| **(BLZ / bankkodo 464 510 12)** | ☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328 |
| **IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484** | 💻 dagmar@rahn76.de |
| **BIC : WELADED1MES** | |

Ekzistas volontuloj kiuj neniam venis al Bona Espero, sed kiuj solidaras kun Bona Espero eĉ post la vivo. Unu el tiuj ekzemploj estas Ester Grosser-Keil en Nürnberg, Germanio. Ŝi subtenis nin per via asocio dum jaroj kaj deziris anstataŭ floroj helpon al la infanoj de Bona Espero kaj ĉiuj siaj amikoj kaj parencoj, esperantistoj aŭ ne, respondis al ŝia nobla peto tre kortuŝitaj rekte al la konto de nia Subtena Asocio.“



***Mi deziras al vi ĉiuj feliĉan, pacan Novan Jaron 2012!***

*Bernd Schönberner*

**donacokonto:**
**konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede**
**(BLZ / bankkodo 464 510 12)**
**IBAN : DE 94 4645 1012 0000 026484**
**BIC : WELADED1MES**

kasistino:
Dagmar Rahn ¤ Hirschfeldstr. 3 ¤ D-59581 Warstein
☏+49-(0)2902-700330, 🖷+49-(0)2902-700328
💻 dagmar@rahn76.de